

La religia penso de Ernest Naville

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 793, 1978 decembro 21 kaj 23

http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj-mp3/Radioprelego_793_SRI_232_1978_12_21_23_La_religia_penso_de_Ernest_Naville.mp3

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj radio-prelegoj ni interesiĝis pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816, li mortis en 1909 94-jaraĝa. Liaj paroladoj kaj libroj, kiuj faris la apologion de la kristanismo havis eksterordinaran sukceson. Nun oni miras, ke oni povis entuziasmiĝi por tiaj prelegoj kaj verkoj, kies argumentado estas neniel scienca. Ni hodiaŭ citos erojn el la verko **La Devo**, kiu aperis en 1870, kaj kiun tradukis en Esperanton la ĝenevano René de Saussure, kiu estas konata por sia teorio pri la vortfarado de Esperanto kaj kritiko de Ido. Kiel vi konstatos, la stilo de René de Saussure tiam ankoraŭ estis iom kaosa. Sed tio ne malhelpas sekvi la personon de Ernest Naville. Tiu esperantigo aperis en 1910, unu jaron post la morto de la ĝeneva teologo.

Cl.- Jen diro de Ernest Naville koncerne la **realecon de la senmorteco**. Ni citas: "...Ni sufiĉe scias pri historio de homaro por diri senhezite, ke la bono neniam estos realigita en sia pleno sur la tero kiu nin portas. Do se ĉio finiĝus kun morto, la konscienco nin trompus, ĉar la bono kiu devas esti ne estus. Sed la konscienco ne trompas nin, ĉar maljunaĝo plej ekstrema, kiun tero konas, estas nur malgranda komenco de nia entuta ekzistado, kaj morto estas nur tagiĝo de eterna tago. La deviga karaktero de 1' bono, la neceseco ke estu kio devas esti, garantias al ni ekziston trans la tombo. Tuj kiam la devo estas komprenita ĝis la profundo de sia signifo, la vualoj de morto disŝiriĝas kaj senmorteco aperas..."

A.- Por Ernest Naville nur kristanoj **povas havi plenan komprenon pri la devo**. Aŭdu tiun citaĵon: "...Devo, Dio, senmorteco; Jen estas pensoj nedisigeblaj kaj intime interligitaj. Se vi disigas konsciencon de kun Dio kaj estonta vivo, vi jam plu ne povos kompreni ĝian devenon, nek ĝian celon. Sendube, foriginta ĉian religian penson, oni povas kompreni, ke oni ne devas ŝteli, ke ne decas mensogi, ke oni devas helpi malsanulon falintan sur la strato kaj doni pecon da pano al malsatigito; oni tion povas kompreni pro tio, ke koro kaj konscienco de 1' homo estas realaĵoj; sed oni ne povas havi plenan komprenon pri la devo, pri la tasko al ni difinita, pri la celo al ni montrita, se oni ne vidas transe de tiu ĉi mondo..."

Cl.- Ernest Naville instruis la submeton al leĝo pri harmonio, kiu fiksas al ĉiu difinitan lokon en la socio kaj speclalajn devojn. Ni citas: "... L'universo, submetita al ĝenerala leĝo pri laboro, estas kvazaŭ grandega fabrikejo, kaj en tiu fabrikejo la brilan kaj puran tolon de ĝenerala feliĉo oni devas teksi. Tia estas la celo de 1' devo, tia estas la volo de Kreinto... En fabrikejo estas la laboro bone kaj rapide farata nur per divido de 1' laboro. En la mondo, ĉio estas submetita al leĝo pri harmonio; tiu postulas unuecon de 1' celo kaj diversecon de la oficoj. Por partopreni la universalan laboron, oni devas unue rekoni la lokon al si difinitan, akcepti siajn specialajn devojn..."

A.- Ernest Naville instruis, ke la divido de la oficoj laŭ la seksoj estas bazita sur faktoj nedetruiblaj. El tiu divido de la oficoj li konkludis, ke la voĉdonrajto ne estas virina afero, sed

vira ofico. Longe similaj diroj de tiu famiĝinta ĝenevano, kiun la kristanoj rigardis kiel gravan filozofon, estis uzataj kontraŭ la emancipiĝo de la virinoj. Ni citas : "La inter la seksoj divido de la oficoj de 1' homa vivo estas neniel arbitra: ĝi estas fondita sur faktoj nedetruiblaj... Jen estas la speciale al virino difinitaj taskoj: taskoj de edukado, taskoj de pio, taskoj de kompato. Tia laborkampo estas ja vasta, nobla kaj bela... Virino devas ĉie interveni, kiel helpantino kaj kunino al viro; ŝi povas alporti bonon en ĉiuj kampoj se nur, kiam ŝi sin mikso en la publikaj aferoj kiuj estas speciala tasko de la viro, ŝi tie intervenos per influo konforma al sia laŭrajta agmaniero, kaj ne celante aŭtoritaton al ŝi ne apartenantan... Estus ja grava eraro se la virinoj kredus, ke ili ne devas sin miksi en la politikaj aferoj. Ili ne devas okupi sin rekte pri ĝi, kaj mi opinias ke malgrandan prudenton montris tiuj Anglaj sinjorinoj, kiuj antaŭnelonge sendis peton al Parlamento por ricevi voĉdonrajton en balotadoj..."

Cl.- Kiam oni aŭdas similaĵojn, oni ne devas forgesi, ke ili estis prononcitaj antaŭ unu jarcento, tio estas, en 1867. Tiam virinoj ne rajtis eniri preĝejon, kiam Ernest Naville prononcis siajn gravajn paroladojn pri **La eterna vivo** aŭ pri **La ĉiela Patro**, nur la viroj estis invititaj iri aŭdi la ĝenevan teologon. Kaj kiam la virinoj plendis pri tiu situacio, tiam Ernest Naville prezentis al ili paroladon pri la temo **La devo**.

A.- Dum la restanta minuto ni faras anoncon pri esperanta aktualaĵo.

Cl.- De la 11-a de januaro 1979 ĝis Pasko, en la enirkoridoro de la Nacia Biblioteko, kiu troviĝas en Berno, grava ekspozicio pri Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando permesos al la publiko, kiun lingvistiko interesas, informiĝi pri la nuna disvolviĝo de Esperanto kaj ricevi ideon pri la ĉefaj etapoj de la planlingva disvolviĝo. Svislando verŝajne pro sia plurlingveco kaj kiel renkontejo inter tri kulturoj okcidentaj, ludis avangardan rolon en la interlingvistika serĉado kaj en la disvolviĝo de Esperanto. Kiel diras bela prospekto anoncanta la ekspozicion: al Esperanto la svisoj kontribuis organize, turisme kaj kongrese, pedagogie, literature kaj radiofonie, akirante grandan prestiĝon kaj donante al la esperanta mondo rimarkindan kulturan heredaĵon. Jen kion la menciita ekspozicio provos montri. Kunlaboris por ĝin pretigi la ĉi-sekvaj fakuloj: Arthur Baur, Tazio Carlevaro, Joseph Chalverat, Perla Martinelli, István Mórocz, Claude Piron, Giorgio Silber kaj mi mem.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!